

MONDCIVITANA REGISTROLIBRO

PROKOKOLO DE LA ADMINISTRA KONSILANTARO

de la 14a de APRILO 2007

(au 12 rue des Fossés-St-Jacques, PARIS-5^{ème})

Ĉeestas :

Daniel Durand, Prezidanto

Liliane Metz-Krencker, Ĝenerala Sekretario

Peter Davidse, Kasisto,

Claudine Fischer, Claude Jousseume, Jean-Claude Loewinski, Joël Luguern, Fernando Elena Diaz, Hermine Togbe Olory, Pierre Pinçon, membroj

Observantoj : Jean-Michel Richard, Odile Durand, Louis Gohin, Alain Bal, Roger Winterhalter, Brigitte Carraz., Jerry Bourgeois, Gaëtane de Pelichy, Monique Boury, Marie-France Prin, André Desnoyers, Vincent Peingnez,

Senkulpiĝis : Geneviève Charpentier, Dorothea Sheasby, Aimé Ruzuba Bisimwa, Ursula Grattapaglia, Jean Verstraeten, Gunnar Ekegård, membroj de la Administra Konsilantaro.

René Wadlow, Dorin Hehn, Landing Niassy, Luc Delcroix, Mustapha Merizak, Gilliane Le Gallic, Michael Ehinger, Georges Federmann.

0. La kunsido malfermiĝas je 9 h 30

- Kunsida prezidanto: Daniel Durand
- Kunsida sekretariino : Liliane Metz-Krencker
- Moderiganto : Peter Davidse
- Distribuado de la tagordo kaj de la bulteno RECIM-mondo n°3 (ne finita)
- Projekciado de fotoj faritaj dum la Seminario de Tutmondismaj Studoj (vd. 1.4.)
- La tagordo estas adoptita sen modifo.

1. Vivo de Mondcivitana Registrolibro

1.1. Aktivecoj de la Estraro

? 29an de majo en Parizo

koncerto de la kvardekjariĝo

Kunveno de la Balotelekta Kontrolkomisiono de Kongreso de la Popoloj

Kunveno de Estraro

? 29an de julio ĝis 5a de aŭgusto en Florenco (Italio)

91a Kongreso de la Universala Asocio de Esperanto. Ĉirkaŭ 2210 homoj el 62 landoj. Geneviève Charpentier kaj Daniel Durand partoprenis en ĝi. Movada foiro la unuan vesperon, dum kiu multaj dokumentoj povis esti disdonitaj, kaj prelego marde la 1an de aŭgusto antaŭ sesdeko da homoj. Krom tiuj du densaj momentoj, multaj kontaktoj estis faritaj kun mondcivitanoj jam enregistritaj aŭ kun reprezentantoj da partneraj organizaĵoj.

? 21an de septembro :

Estrara kunveno en Parizo

Laborkunsido kun Patrice Lovesse, organizinto de la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon, por validigi la procezon planitan en la kondiĉaro de ASCOP. Transdono de la subvencio de 500 € atribuita de la Franca Registrocentro al BCEBI por la Seminario.

Partopreno en la emanigo de UNESKO-premio pri Pac-Edukado al la juĝisto WEERAMANTRY.

Gazetkonferenco ĉe la Fondaĵo por la Homa Progreso kun la Juĝisto Weeramantry. Tiu konferenco ne atingis la esperitan sukceson, sed ebligis refari kontakton kun la animantoj de la Fondaĵo.

? 6an ĝis 8a de oktobro en Bohicon (Benino)

Seminario de Tutmondismaj Studoj kun la partopreno de 35 anoj. La Seminario malfermiĝis kun la ĉeesto de multaj eminentuloj, kaj interalie de la reprezentanto de la Justicministro. Daniel Durand kaj Liliane Metz-Krencker reprezentis Mondcivitanan Registrolibron.

? 4an de novembro :

En Binges (Côte d'Or, Francio) ĉe Alain Bal. Kunveno de la Balotelekta Kontrolkomisiono de Kongreso de la Popoloj.

? 20an kaj 21an de novembro en Ĝenevo

Kunveno laŭ invito de UBUNTU, organizaĵo iniciatita de Federico Major, eksa Ĝenerala Direktoro de UNESKO por fundamenta reformo de la internaciaj institucioj. La nuna kampanjo iras de 2006 ĝis 2009. Studado laŭ la « Londona Deklaracio » por monda demokratio, homaj rajtoj, paco kaj sekureco, homa daŭra disvolviĝo kaj la kultura diverseco, same kiel por la starigo de monda jura kadro. Tiu kunveno ebligis al Liliane Metz-Krencker labori kun Robert Wheeler pri la Kongreso de la Popoloj.

? 7an ĝis 12a de decembro en Laknaŭo

7a renkontiĝo de la Justicestroj, kunvenintaj en la kadro de esplorado bazita sur la artikolo 51 de la Hinda konstitucio, kaj 3a simpozio de la civila socio pri la temo « Al nova monda civilizacio » Liliane Metz-Krencker reprezentis Registrolibron. En tiu kadro estis prononcita, la 11an de decembro, la tutmondiĝo de la Civita Montessori Lernejo « City Montessori School » (31.000 lernantoj en 20 establoj). CMS estas la ununura lernejo, kiu aranĝis fakon de pac-edukado « WUPED ».

Dum tiu kunveno en Laknaŭo estis lanĉita ankaŭ la Monda Movado por Monda Demokratio (anglalingve : WMGD : World Movement for Global Democracy).

1.2. Strukturoj de Registrolibro

La modela statuto adoptita pasintjare dum la Administra Konsilantaro estas adoptita, post adaptiĝo, de 5 Registrocentroj : Francio, Hispanio, Bohicon (Benino) Accra (Ganao) kaj ĵus laste Bamako (Malio).

Pro sugesto de Gunnar Ekegård, la dokumento pri « Direktivoj por la Korespondantoj » estas reverkendaj laŭ kontrakta formo. Tiu reverkado devos integri la baldaŭan ŝanĝon de la rolo de la Korespondanto, pro tio ke baldaŭ ekzistos ebleco por iu ajn rekte enregistriĝi per Interreto. Ni entagordigos tiun punkton por la venontjara kunveno.

Eble estus la momento sendependigi Mondcivitanan Registrolibron el la franca leĝo. Fakte estis ofte konstatite, ke ĉar Registrolibro havas sian sidejon en Francio, pro historie pravaj kialoj, foje estas ĝeno por la enregistrado de homoj, kiuj tro konfuzas Inter « Civitanoj de la Mondo » kaj « Civitanoj de Francio ». Nu Registrolibro entenas enregistritojn el 114 landoj, strukturojn en pli ol 40 landoj kaj neniel rilatas kun franceska vido al la mondo. Tial Daniel Durand sugestas, ke venontjare, dum ĝenerala Asembleo, Mondcivitana Registrolibro metu la organizaĵon sur transnacion nivelon rekte sub la aŭtoritato de Kongreso de la Popoloj. Kompreneble tiu sinteno ne maleblus meti statuton ĉe diversajn ŝtatojn, interalie laŭ konsidero de la monaj regionoj, sed ĝi estus plene konforma al la estonta evoluo, pri kiu oni parolos en la punkto 4, nome la ebleco sin enregistri kiel civitanon de la mondo el ĉiu ajn loko de la tero, per la interreta enregistriĝo.

1.3. Aktivecoj de la Registrocentroj kaj Korespondantoj

La Prezidanto invitas la asembleon legi tion, kio estas jam skribita en la bulteno RECIM-mondo, disdonita komence de la kunveno. Por aldoni kompletigojn, la parolo estas donita al la ĉeestantaj Registrocentraj reprezentantoj :

? Francio

Claude Jousseau por Francio : Sekve de la Artista Koncerto por la kvardekjariĝo de la Alvoko de la 13, la franca Registrocentro plu subskribigas la artistojn. La projekto krei interretan TTT-ejon apartan al la Franca Registrocentro ne estas realigita. La Centro est je la antaŭtago de la modifo de la estrara konsisto.

? Hispanio

Fernando Elena Diaz por Hispanio : La Centro komencis interretan TTT-ejon : www.recim.es. Ekzistas unu malfacilaĵo por la ret-enskribiĝo. La Centro provas rekonsistigi la listojn de la Mondcivitanoj, ĉar kelkaj fruuloj transloĝiĝis.

? Svisio

Claudine Fischer por Romanda Svisio : la problemoj de la svisaj Mondcivitanoj estas ilia propra unueco : ili estas dividitaj laŭ lingvoj, sed ankaŭ laŭ kulturoj, malgraŭ ĉiuj penoj por kunigi ĉiujn en la saman strukturon. Sialflanke la Mondcivitana asocio de germanlingva Svisio kunvenos pro Ĝenerala Asembleo la 28an de aprilo por provi solvi la gravajn internajn problemojn, kiujn ĝi renkontas, interalie pro la lukto kontraŭ la novnaziismo.

? Nederlingvaj landoj

Peter Davidse por la nederlingvaj landoj : Peter konsentas doni sian nomon kiel Korespondanton de Registrolibro, ĉe la Mondfederaciista Centro kaj la Tutmondista centro de Haarlem.

1.4. Seminario de tutmondismaj studoj en Bohicon (Benino)

Tiu seminario sukcese okazis de la 6a ĝis la 8a de oktobro 2006. 35 partoprenintoj. Tre oficiala malfermo kun la ĉeesto de elstaruloj, el kiuj la reprezentanto de la Justic-ministro. Televidaj raportetoj povis esti vidataj almenaŭ 12foje tra la lando. La protokolo estis tuj realigita, poste disdonita de ni en franca, angla kaj Esperanto al ĉirkaŭ 200 adresatoj. Krom la subvencio atribuita de la franca registrocentro, kelkaj lokaj registraj responsantoj povis profiti el stipendioj atribuitaj de la Registrolibro (vd. en « Financoj », ĉapitro « animadoj »)

Tie estis plantita la unua « Arbo de Monda Unueco », pri kiu nun ekzistas poŝtaj kartoj.

Aparte rimarkindas la intervenoj de la profesoroj Gbegnonvi kaj Azilino, kiun oni povas trovi en ilia tuteco en Interreto (franclingve)

<http://www.recim.org/dem/gbegnonvi.htm>

<http://www.recim.org/dem/azilino.htm>

Dum tiu seminario estis anoncigitaj la tutmondiĝoj de Agbangnizoun, najbara komunumo de Bohicon, loĝata de ĉirkaŭ 35.000 homoj kaj kelkajn tagojn poste, de Kpomasse (ĉirkaŭ 45.000 loĝantoj), sed tiuj tutmondiĝoj ankoraŭ ne estas konkretigitaj per la subskribo de la ĉarto.

Inter la konsekvencoj de tiu seminario, oni povas raporti pri la starigo de la Registrocentroj de Bohicon (Benino), de Lomeo (Togolando), kaj de Accra (Ganao), kaj ankaŭ la projekto de Afrika Reto de Mondcivitana Registrolibro.

Estas projektataj aliaj seminarioj : Accra en 2008, Bukavu (Demokrata Respubliko de Kongio) eble en oktobro de tiu ĉi jaro, Sofio (Bulgario) ne antaŭ 2008. Oujda (Maroko) en pluraj jaroj. Ili estus ankaŭ aranĝeblaj en Senegalio aŭ en Gambio.

1.5. Petletero por la Tago de Monda Unueco.

Sub la nomo de ASKOP estis lanĉita kampanjo de petletero al la Kongreso de la Popoloj, por ke tiu ĉi dekretu la ekvinoksan tagon de la 20 (aŭ 21a) de marto kiel tagon de Civitanoj de la Mondo, Tagon de Monda Unueco. Dokumentoj estas je la disponi de la interesiĝantoj por klarigi en kiu klopodo situas tiu iniciato,

same kiel folioj por la subskriboj. Tiu petletero kompreneble havas ligan kun la plantado de la Arbo de Monda Unueco en Bohicon, unua de longa venonta vico.

1.6. Aktivecoj ligitaj al UNESKO

Ni denove nombras inter la asociojn en rilatoj kun UNESKO. Por formaligi tiun re-akceptigon oni petas plenumi kutiman dosieron : statuto, agadraportoj, financaj raportoj. Sed oni ankaŭ petas de ni oficialan deklaron pri la situacio en Tajvano. Fakte ekzistas tre grava streĉo inter Tajvano kaj Ĉinio, kaj UNESKO ne deziras kunlabori kun organizaĵoj, kiuj laborus por la subteno de Tajvano kontraŭ Ĉinio.

El la dekminuta debato rezultas tiu pozicio, ke Mondcivitana Registrolibro zorgas rilatojn nur kun la civitanoj kun celo de edukado al civitismo kaj al paco.

2. BILANCO KAJ FINANCOJ

2.1. nombro da enregistriĝoj en 2006 :

- 125 kartoj liveritaj de la internacia Centro laŭ senperaj petoj ;
- 186 kartoj liveritaj de la internacia Centro pro la aktiveco de la Korespondantoj ;
- 211 kartoj liveritaj de la Registrocentroj, el kiuj 194 de la Franca Registrocentro ;
- 203 provizoraj atestoj de registriĝo, atende de pago, liveritaj de la internacia Centro.

2.2. financa bilanco por la jaro 2006

Peter Davidse prezentas la financon bilancon por 2006

ENSPEZOJ	
Individuaj kontribuajtoj :	3.227,50 €
Kontribuoj transpagitaj de la Centroj :	848,18 €
Kontribuo de Pacista Unuiĝo :	2.744,05 €
Kartoj liveritaj de Registrolibro :	3.074,81 €
Kartoj venditaj al la Centroj :	1.582,50 €
Interesoj :	342,74 €
Vendoj	16,00 €
Abonoj	80,00 €
Sume :	12.215,78 €
ELSPEZOJ	
Sekretariato :	2.100,00 €
Veturoj :	1.233,69 €
Sekretariejo ekipoj :	10,90 €
Tradukoj :	0,00 €
Presado :	1.527,96 €
Poŝtaj elspezoj :	2.512,98 €
Telefono kaj Interreto :	379,97 €
Financaj kostoj :	4,00 €
Lokalo V. Auriol (kunproprietaj) :	654,20 €
Lokala ekipoj :	0 00 €
Asekuroj, elektro, impostoj :	791,27 €
Animadoj (Bohicon) :	1.641,93 €
Kotizo al ASKOP	20,00 €
Diversaĵoj (kunveno por ĜA) :	93,00 €

SUMO :	10.969,90 €

Pozitiva rezulto de la jaro 2006 : 1.245,88 €

2.3. Alvoko por kontribuajtoj

Eĉ se la bilanco de la jaro 2006 estas pozitiva, necesas konsideri, ke la koston de la balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj pagos Registrolibro, koston, kiun oni povas taksi je

10.000 € kaj kiun oni devos ripeti en 2010 kaj 2013. La memvolaj individuaj kontribuajoj estis pagitaj nur de 27 homoj !

Ni deziras, ke la estonta instalado de elektronika pagsistemo plifaciligos la pagon de kontribuajoj pli multaj kaj pli regulaj, kaj ni petas la Korespondantojn kaj la Registrocenrojn ne forgesi tiun esencan aspekton de nia aktiveco.

2.3. Kosto de la karto

Rememorigo de la principoj formulitaj en la protokolo de la 12a de marto 2005, alineo 2.3.

Propono de Joël Luguern estas indeksi la koston de la karto sur la prezo de poŝtmarko por enlanda sendo. El la debato, kiu instaligis pri tio, aperas ke la proponita sistemo montrus pli grandan justecon, sed samtempe estus multe pli malfacile aplikebla.

Do oni rememorigas la bazan principon jam dirita dum la kunveno de la Administra Konsilantaro la 3an de majo 2003 : La oficiala prezo de la legitimkarto estas 15 €.

Por la homoj en necerta aŭ malmulte monhava situacio duonigo estas farebla.

Plie interkonsentoj eblas inter Registrolibro kaj la Registrocenroj kaj Korespondantoj, kiuj faras tian peton (tia interkonsento okazis kun Karl Kpodo en Ganao).

Estas ankoraŭ rememorigite, ke la provizoraj enregistriĝaj atestoj liverataj de Registrolibro ebligas gradan pagon de la enregistriĝo dum tri jaroj.

3. PARTOPRENO

3.1. Kreado de Mondcivitana Reto

La celo de tiu reto estas la kreado de amikecaj kaj interŝanĝaj ligoj inter Mondcivitanoj. Origine proponita de Marie-France Prin, provo estis farita de Mato Spekuljak (Kroatio) kiu kunigis centon da nomoj ; poste li forlasis tion pro personaj kialoj.

Kelkaj retoj jam funkcias, el kiuj kelkaj je internacia nivelo. Inter ili, la ĉefa kaj plej proksima al niaj principoj estas «SERVAS», kreita en 1948 surbaze de pacista kaj neperforta ideologio. La demando estas ĉu povas ekzisti en tiu reto apartaj servoj por la Mondcivitanoj.

Ankaŭ notindas la esperantista reto 1 « Amikeca Reto ».

3.2. ASKOP-forumo por la Mondcivitanoj

De la rezigno de Josep Ortega, la forumo de ASKOP serĉas moderiganton. Tamen tiu « moderiganto » devas esti tuta teamo. Kiel ebla alternativo : ke la ASKOP-forumo produkti kondiĉaron, kiu ebligas al ĉiu mond-civitano enkonduki debaton, sed kun la kondiĉo konduki ĝin ĝis la fino, t.e. ĝis la sintezo. Josep iniciatis « Virtualan kongreson » kun elvolviĝo ĉefe en angla lingvo. Oni povas aliri la arkivejon aliĝante al worldcit@googlegroups.com.

4. Eldonado

4.1. Refaro de la interreta TTT-ejo (Thibault Carrier)

Prezentado de la TTT-ejo nun konstruata, kaj provizore entenata en :

<http://www.bouge-en-bresse.info/fre/>

Tiu TTT-ejo estos preta post pluraj monatoj.

Vidu la aneksaĵon por la specifaj kaj teknikaj punktoj starigitaj pro tiu refaro.

{4.2. et points suivants : non abordés}

5. Kongreso de la Popoloj kaj ligitaj institucioj

5.1. Balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj.

Daniel Durand klarigas la kurantan procezon tian, kia ĝi estas prezentita en paĝo 10 de RECIM-mondo n-ro 3. La Franca Registrocenro sin devontigis aranĝi la voĉnombran tagon.

5.2. Balotelekta kontrolkomisiono

Tiu komisiono kunvenis dufoje por determini la precizajn kandidatiĝajn kondiĉojn. Ĉar la kandidatiĝoj ne estis tro multaj la

kontrolkomisiono ne devis kunveni trian fojon. Do estas 20 kandidatoj, kies prezentado korespondas al la postulitaj kondiĉoj. La estonta faro de la Kontrolkomisiono estos la voĉnombrado la 22an de septembro 2007.

La klariga dokumento de la balotelekta procezo entenas alvokon por memvolaj kontribuajoj por kompensi la koston de la balotelektoj.

La Kontrolkomisiono publikigos komunikaĵoj komence de majo kaj komence de ĉiu el la venontaj monatoj por anonci la venontajn balotelektojn. Tiu komunikaĵo estos transpublikigita de la Franca Registrocenro al la franca gazetaro.

5.3. Komitato por la Kongreso de la Popoloj

Ni bezonas plu gardi tiun asocion kaj por ebligi la ententigon de la ĉekoj, kiuj estus faritaj al la Kongreso de la Popoloj, kaj por ebligi la organizadon de la konsulaj invitiloj de la Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj por la estonta plena kunsido. Laŭ la esploroj faritaj de Peter Davidse, la komitato por la Kongreso de la Popoloj estis deklarita ĉe la Pariza Polica Prefektejo la 2an de junio 1969 (n°2026P). Pro la arkiva sistemo de la Prefektejo ne estis eble havigi al si kopion de la statuto. Konsekvence ni aranĝos modifan deklaron de la statuto kaj de la Estraro. Peter Davidse, Gaëtane de Pelichy kaj Daniel Durand konsistigos la estraron. La deklaro estos krome subskribita de Basile Ginger.

Joël Luguern kaj Basile Ginger faris la necesajn klopodojn por ke la saldo, kiu restas sur banka konto ĉe BNP, estu ĝirita en la bankan konton de Registrolibro. Peter Davidse telefonas al la numero indikita de Joël Luguern por la pluzorgo de la operacio.

5.4. Plena kunsido de la Kongreso de la Popoloj la 3an kaj 4an de novembro 2007.

Estis decidite, ke tiu kunveno okazos en kunvenejo proksima al internacia flughaveno. Oni plu serĉas la idealan lokon : facile atingebla, agrabla, bone aranĝita kaj ne multekosta. La esplorado pluas.

La tagordo de la kunveno devas esti preparita sufiĉe rapide. La sugestoj kaj alvokoj devas atingi Roger Winterhalter, kiu proponos preparkunvenon en Mulhuzo komence de la somero.

Oni povos ankaŭ demandi la Mondcivitanojn per interreto pri la proponoj, kiujn ili faras al la Kongreso de la Popoloj.

5.5. Ĝenerala Asembleo de ASKOP

(Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj)

Samdate kaj samloke la organizaĵoj membroj de ASKOP estos invititaj kunveni. Je la tagordo : interna rearanĝo de ASKOP kaj komenco de kunlaborado kun Kongreso de la Popoloj.

5.6. Institut de Tutmondismaj Studoj (IEM)

IEM estis kreita de la Kongreso de la Popoloj en 1977 en la perspektivo de universitata klopodo kaj laŭ jaraj sesioj en determinita loko.

Ĉe ASKOP, la Seminarioj de Tutmondismaj Studoj estis konceptitaj por la klerigo de la bazaj aktivuloj, laŭ postuloj kaj en la lokoj plej diversaj.

Ambaŭ metodoj kompletigas inter si. El renkonto inter Marc Garcet, prezidanto de IEM kaj Daniel Durand, rezultas, ke kunlaborado stariĝos inter IEM kaj niaj seminarioj. Por konkretigi tiun kunlaboradon Marc Garcet petas, ke Mondcivitana Registrolibro partoprenu en la Plenuma komitato de IEM. Per ĝenerala interkonsento, Liliane Metz-Krencker, kandidatino al tiu funkcio, ricevas la mandaton de la Administra Konsilantaro de Mondcivitana Registrolibro.

La sesio 2007 de IEM temos pri la « Loka socia kohereco dum erao de tutmondiĝo », de la 28a ĝis la 31a de aŭgusto 2007.

<http://www.aigs.be/home.htm>

5.7. Jura Registro-Servo

La Jura Registro-Servo estas la lasta fonditaĵo de Kongreso de la Popoloj, en marto 2006. Tiu servo konkretigas la naskigon de monda civila juro (vd. pri tio la libro « Ekapero de Monda Juro » laŭ Jean-Marie Breton, eksa Ĝenerala sekretario de Mondcivitana Registrolibro)

(<http://perso.orange.fr/mondanisto/mondjuro.htm>). La plenumo de tiu decido estigis la kreadon de servo konsistanta el kvar fakoj :

- statutoj, reglamentoj kaj konstitucioj ;
- plurflankaj kontraktoj ;
- ĉartoj, deklaroj kaj unuflankaj sindevontigoj ;
- petskriboj kaj rezolucioj faritaj al la Kongreso de la Popoloj.

Daniel Durand laŭtlegas la paĝon 3 de RECIM-mondo n-ro 3. La Administra Konsilantaro per ĝenerala interkonsento aprobas la taŭgecon de tiu kreaĵo kaj la prezentadon, kiu estas farita.

<http://www.recim.org/civil/>

6. Komisiono de Tutmondiĝoj.

La debato animita de Roger Winterhalter okazis de 14 h 40 ĝis 16 h 10. El ĝi estos verkita aparta protokolo.

7. Eksteraj rilatoj

7.1. CMS –Laknaŭo

Sekve de la tutmondiĝo de la Civita Montesori Lernejo en Laknaŭo, Liliane Metz-Krencker eniris en la Konsultan Konsilion de la Pac-Eduka fako de CMS.

7.2. Esperantistaj organizaĵoj

Komence de aŭgusto okazos en Bouresse (apud Poitiers, FR 86) kunveno aranĝata de SAT (Sennacia Asocio Tutmonda). La temo estos komparo inter sennaciismo de la fondinto Lanti kaj monda civitaneco. Daniel Durand partoprenos en ĝi.

8. Projektoj kaj kalendaro 2007-2008

- § majo 2007 : kunvokado de la nunaj elektitaj delegitoj al la plena kunsido de Kongreso de la Popoloj ; preparo de la balotelektaj dokumentoj ;
- § junio 2007 : dissendado de la balotelektaj dokumentoj al la voĉdonantoj ; kunveno, kiu estos kunvokita de la Prezidanto de Kongreso de la Popoloj por la konsistigo de la tagordo de la plena kunveno ;
- § aŭgusto 2007 : staĝo en Bouresse ; Kongreso de la Mondfederaciistoj en Ĝenevo kaj Montreŭ ; 28a sesion de la Instituto de Tutmondismaj Studoj en Eben Emaël (Liège, Belgio)
- § septembro 2007 : starigo de la nova TTT-ejo : fermiĝo de la balotelektoj kaj voĉnombrado de la balotiloj ; kunvokado de la novelektitoj al la Plena kunsido de Kongreso de la Popoloj.
- § oktobro 2007 (sub kondiĉo) Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bukavu (D.R. Kongio)
- § novembro 2007: Plena kunsido de Kongreso de la Popoloj ; Ĝenerala asembleo de ASKOP.
- § marto 2008 : Tago de Monda Unueco kun konferencoj, ekspozicioj kaj aliaj en VERDUN, en la Monda Paco-Centro.

9. Diversaĵoj

La ideoj kaj proponoj estis traktitaj de 13 h 10 ĝis 14 h 40. Vd. en anekso.

Fermo

Dankon pro ĉies partopreno.

La kunsido fermiĝas je 18 h 55.